

PREZIDANTA BULTENO

Universala Medicina Esperanto-Asocio | Fondita 1908 | Aliĝinta al UEA



Interreto

La estraro decidis ne plu uzi la Tvitro-konton de la UMEA pro la ŝanĝoj en la administracio de la servo kaj la nova eldonstrategio.

Interreta UMEA-diskutlisto

D-ro Ludoviko Molnar el Budapeŝto, Hungario, informis, ke la nova estro de la de la diskutlisto

[medicinistoj-por-](mailto:medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com)

esperanto@googlegroups.com

estas nia kolego D-ro Rodrigo Alberto Ramírez Zuluaga el Kolombio. Tiu ĉi diskutlisto fondiĝis antaŭ 12 jaroj, kaj ĝia celo estas subteni la agadon de la Universala Medicina Esperanto-Asocio. Por antaŭenigi la medicinan aplikadon de Esperanto kiel ilo por egalrajta komunikado ni rekomendas al ĉiuj membroj de nia UMEA aliĝon al la listo.

Sukcese okazis la 22-a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso (IMEK) en Hódmezővásárhely kaj Szeged, Hungario



Inter la 13-a kaj 17-a de julio 2022 okazis la 22-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso (IMEK) en hibrida formo. Ĉeftemoj de la kongreso estis „Novaj eblecoj de la diagnozado kaj kuracado de civilizaciaj malsanoj“ kaj „La metodo de d-ro Masayuki Saionji – historio, rezultoj kaj estonteco“. Kadre de tiuj temoj okazis prelegoj kaj prezentadoj en kvar lingvoj – angle, esperante, hungare kaj pole. Partoprenis ĉi foje 83 medicinistoj el kvar landoj, estis prezentitaj 59 altnivelaj prelegoj. La kongreso okazis dank’ al proksima kunlaboro de altrangaj reprezentantoj de la universitatoj en Krakovo (Polando) kaj Szeged (Hungario), bazita sur la sperta kaj brila prepara kaj organiza laboro de Prof. d-ro habil. Włodzimierz Opoka kaj s-ino Katarina Faragó kun sia laborema surloka skipo. Honorigis la kongreson per persona ĉeesto dum la solena malfermo kaj salutvortoj la urbestro de Hódmező-vásárhely, D-ro Péter Márki-Zay. Ĉeestis kaj parolis dum la kongreso ankaŭ s-ino Gyöngyi Mézes (Perlo Miela), nova prezidantino de la Hungara Esperanto Asocio. En la regiona Biblioteko Somogyi en Szeged okazis ekspozicio de la 22-a IMEK kaj la ekspozicio “Esperantaj Momentfotoj”. Festparolis tie s-ro János Nagy, vicprezidanto de HEA. Do resume la tuta kongreso estis granda sukceso, kiu fortigis pacan kunlaboron inter medicinistoj el diversaj landoj en bonega etoso.

Bondeziroj

UMEA deziras al ĉiuj legantoj kaj gesamideanoj benitan kristnaskon kaj bonan glitan en la novan jaron. Ni deziras al ĉiuj sanajn jaron 2023. Restu fortaj!

Trilingvaj tradukhelpiloj por la medicina prizorgo de ukrainaj rifuĝintoj

Surbaze de la libro „Ärztlicher Dolmetscher“ fare de la D-roj Gert kaj Uta Hoyer ege laboremaj volontuloj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo ĉirkaŭ D-ro Ludoviko Molnár kaj D-rino Julianna Farkas kun helpo de internacia sam-ideanaro kaj apogita de la UMEA kreis trilingvajn tra-dukhelpilojn, kiuj enhavas simplajn frazojn el tipaj dialogoj inter helpantoj kaj pacientoj en Esperanto kaj la ukraina, kun aldono de po unu alia lingvo. Pretas jam versioj kun la slovakaj kaj portugala lingvo.

La libro „Ärztlicher Dolmetscher“ dum la unuaj du eldonoj de la ekde 1999 ne plu ekzistanta eldonejo Johann Ambrosius Barth enhavis inter si facile kompareblajn tekstojn de bazaj dialogoj inter medicinistoj kaj pacientoj en 17 lingvoj, inter ili ankaŭ versio en Esperanto. Post kiam la eldono estis prizorgita de la eldonejo Springer, la Esperanto-ĉapitro estis forstrekita. Le Springer-eldonejo ne permesis al ni uzi la enhavon de la 3-a aktuala eldono sen aparta multekosta kontrakto aŭ memdevigo al nur limigita eldonkvanto. Tiam kontrakton ni ne pretis fari pro timo de eventualaj juraj komplikajoj kaj por eviti nur komercelajn kostojn. Tamen la D-roj Hoyer, aŭtoroj de la libro, tenis la kopirajton por la tuta materialo, kiu ne troviĝas en la springer-eldono – t.e. la Esperanto-ĉapitro. Grandanime ili permesis al ni uzi la Esperanto-tekston de la libro laŭ nia bontrovo por helpi la prizorgon de rifuĝintoj. Pro tiu ni ege dankas. Do la aldonitaj trilingvaj tradukhelpiloj estas utilaj jam en si mem, sed kombine kun unu el la eldonoj de la printita libro sumiĝas al eĉ pli ampleksaj kaj bone uzablaj iloj por traduki simplajn interparolojn inter pacientoj kaj medicinistoj el multaj diversaj landoj.

La dua eldono de „Ärztlicher Dolmetscher“ ankoraŭ estas havebla ĉe diversaj interretaj brokantejoj.

La tria, aktuala eldono estas mendebla ĉe Springer:

<https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-662-48739-6>

La jam pretaj tradukhelpiloj estis dissenditaj al la membroj de nia asocio kaj estas elŝuteblaj el nia retejo.



Medicina doktoro ekde 65 jaroj!



Tiu ĉi diplomo estas atesto de la mondfama Semmelweis-universitato, ke d-ro Ferenczy sukcese doktoriĝis antaŭ 65 jaroj!

Ankaŭ kiel sportkuracisto d-ro Ferenczy deĵoris: apud sia ĉeflaboro li zorgis pri sama futbala teamo, futbal-grupo Győri MÁV DAC, 43 jarojn sen interrompo (1963-2006). Pro tiu li ricevis diplomon kiel „Hungara rekordulo“ simile al la dekstre videbla.

Jubileo kaj distingoj de nia honora prezidanto, d-ro Imre Ferenczy



En tiu ĉi jaro nia honora prezidanto festis rimarkindan jubileon, nome la 90-an naskiĝdatrevenon. Honore al tiu elstara evento li ricevis gratulojn de la urbestro de Győr (Hungario), d-ro David Fekete. La supra foto montras la urbestron maldekstre kaj d-ron Ferenczy dekstre. Pro sia daŭra kaj senlaca agado kiel kuracisto kaj aktivulo por Esperanto, li en tiu ĉi jaro ankaŭ ricevis aliajn distingojn kaj diplomojn.



La supra diplomo honorigas la fakton, ke d-ro Ferenczy nun ekde 72 jaroj aktivas en la Esperanto-movado!

Ni ĉiuj ege ĝojas pri la sukcesoj kaj jubileoj de nia kara honora prezidanto, motoro de la UMEA ekde multaj jardekoj.

Ni deziras al nia meritplena kolego sanon kaj bonfarton kaj ege deziras, ke li kiel ĝis nun ankoraŭ multajn jarojn povos inspiri nian fakan asocion kaj apogi ĝin kun valoraj konsiloj kaj propraj kontribuoj!

Flava febroy

Pri flava febroy vi povas informiĝi ĉi tie:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Flava_febroy

Atentu: mankas en nia asocio volontuloj, kiuj okupiĝas pri vikipedio. Gravus, ke ankaŭ bonaj artikoloj pri medicinaj temoj estas troveblaj tie. UMEA fakte ne plu havas la monopolon pri medicina terminologio, ĉar fakterminoj aperas en vikipedio sen ke ni estis konsultitaj antaŭe. Gravus tial, ke ni estas reprezentitaj en vikipedio.

Mesaĝoj el la medicina mondo

Imre Ferenczy, Hungario

Karaj Gesamideanoj, Geamikoj!

Mi tre ĝojas pro la ricevo de la Diplomo. Por akiri ĝin mi laboris 72 jarojn per kaj por Esperanto. Mi ne forgesas: sen via kunlaboro, kontribuo mi ne estus kapabla atingi rezultojn. El Hungario mi mencias d-ron Ludoviko Molnár, d-ron István Hegyi, s-ron István Gulyás kaj s-rinon Katarina Faragó. Ili multe helpis min en mia organiza agado. Koran dankon al vi ĉiuj. El Japanio: kore kaj dankeme mi mencias d-ron Hideo Shinoda. Dum sia vivo li subtenis min ankaŭ finance por partopreni kelkajn Universalajn Kongresojn.

En tiu tempo nia medicina movado grave aktiviĝis en- kaj eksterlande. Prof. d-ro Vladimiro Opoka estas elstara aganto kaj ni komune elpensis kaj organizi en ĉiu dua jaro la IMEK-ojn. Fine, sed ne lastavice mi esprimas mian tre koran dankon al d-ro Christoph Klawe, prezidanto de UMEA, ke li akceptis la taskon gvidi nian Asocion, inter ne facilaj cirkonstancoj.

Karaj Geamikoj, Gekolegoj! Kompreneble mi daŭrigas mian agadon kadre de UMEA. Mia unua tasko estas reaktivigi niajn Landajn Delegitojn.

Kun amikaj salutoj,
d-ro Imre Ferenczy

Elvis Hakizumwami, Demokratia Respubliko Kongo

...Estas pro manko de libera tempo, ke ĝis nun mi ne kapablas ĉeesti al...esperantaj kunsidoj. Vi scias, en medicina fakultato kursoj multnombros, feliĉe ni alproksimiĝas la finon.

Pri novaĵoj en mia urbo Goma / provinco Nord-Kivuo, ĉi-lastatempe multaj personoj sin decidas volonte ricevi iliajn vakcinojn kontraŭ koronaviruso, ĉar ili rimarkis, ke multaj homoj daŭre mortas en la urbo, precipe ke kun la alveno de multaj rifuĝintoj en la ĉirkaŭaĵoj de Goma pro la milito, kiu ŝiras tiun provincon, multaj personoj vivas en rifuĝejoj en malbonaj vivkondiĉoj, kiuj favoras la disvastigojn de malsamaj malsanoj kiel koronaviruso, ktp...

Krom la koronaviruso en la Urbo Goma, en la najbara provinco de Iturio, norde de Nord-Kivuo, "flava febroy" minacas en tiu regiono, sed feliĉe la organizo "senlimaj kuracistoj" el Francujo kunlaboras kun la sana ministerio por doni necesajn kuracilojn por batali kontraŭ tiuj malsanoj en tiu regiono.

La flava febroy estas malsano kiu transdoniĝas per kuloj.

Laŭ la plej ĵusa deklaro de la Monda Sana Organizo en la Demokratia Respubliko Kongo, oni jam nombris 1.044 suspektitajn kazojn de flava febroy. Notindas, ke tiu malsano atakas homojn kaj en la humida tropika arbaro, kie vivas primatoj kiel goriloj, simioj. Kiam ili estas...pikitaj de tiuj kuloj, kiuj transdonas tiun mikrobon, ili malsanas. Estas pro tio oni malpermesas al homoj konsumi sovaĝan viandon en nia regiono. Mi kore salutas vin.

Via ELVIS

Laminaria japonica kaj Fucus

...estas la plantoj, surbaze de kiuj la produktoj de VERTERA Organic estas produktitaj. Legu pri Laminario tie:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Laminario>

Ege eteta artikolo pri Fuko en vikipedio ĝis nun nur ekzistas en - Ido!

<https://io.wikipedia.org/wiki/Fuko>

UMEA-medaloj

Estis bela tradicio de UMEA eldoni medalojn okaze de diversaj renkontiĝoj aŭ jubileoj. Nuntempe UMEA decidis ne plu postuli membrotizojn, kaj sekve ne plu enspezas monon. Mankas ankaŭ malavaraj mecenatoj. Se tamen tiaj estas inter la legantoj de tiu ĉi bulteno, la propono de s-ro Boon-Tudts estas tuj kaj facile realigebla.

Jozefo Reinvar, Slovakio

...Estis mia plezuro sabate virtuale renkontiĝi dum la UMEA programero de la 3-a VK dum la UMEA programero...

Mi koncize informis vin dum la UMEA programero pri organikaj produktoj de la kompanio VERTERA Organic kaj iliaj tre bonaj efikoj por homa sano kaj dum la Kovim-pandemio kaj kontraŭ civilizaciaj malsanoj. Mi kaj mia tuta familio kaj multaj aliaj, kiuj ĉiutage manĝas tiun ĉi ĉelan nutraĵon pravas efikan agon de 3 plej ĉefaj efikoj de la maraj algoj (sentoksikado, malaltigado de radiado, kompleksa kaj harminigita nutrigado de tuta homeostazo)...

Estime kaj kore salutas vin

Jozefo

Bert Boon-Tudts, Belgio

Saluton karaj geamikoj,

esperante, ke vi ambaŭ fartas bone, mi petas vin se eble pripensi mian jenan proponon.

Sendube vi konas "Mercy ships". Mi private jam kelkajn jarojn finance subtenas la projektojn de tiu samaritaneca medicinista organizo. Mi nun proponas al vi kaj al UMEA krei en la sino de nia fakgrupo projekton por subteni finance la ĵus konstruitan, duan ŝipon. Kiel iniciatinto de ENA mi evidente preferus eldoni kaj profitcele vendi medalon kun tiucela aspekto por poste (post ricevo de la kostoj) povi donaci la profiton de la vendado al "Mercy ships". Tia medalo krome taŭgus kiel reklamilo, ne nur por tiu korfavora internacia projekto, sed ankaŭ por la agado kaj la karismo de UMEA mem kaj por...Esperanto!

Provizore mi- tute nedevige- proponas konkrete ekzemple tian aspekton:

Averse: supre la surskribo "Mercy Ships", meze bildo de unu el ambaŭ ŝipoj, sube "Samaritanaj Ŝipoj".(aŭ aliaj...) kaj la jarindiko 2023.

Reverse: supre, U.M.E.A.; meze la blazono de UMEA, sube UNIVERSALA MEDICINISTA ESPERANTO-ASOCIO (aŭ aliaj)...

Amike kaj numismate,

Bert